



PUJULA-VALLES

FRENEZO

Du unuaktaj originale verkitaj drametoj

KUN LA PORTRETO DE LA AŬTORO

~~~~~  
AŬTUNAJ VENTOJ

NOVELO  
~~~~~

PARIS


LIBRAIRIE HACHETTE ET C^{ie}


79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

1909

—
Droits de traduction et de reproduction réservés.







FREDERIKO PUJOLÀ-VALLÈS



ANTAŬPAROLO

Simpleco, facileco kaj logika reguleco, jen estas la unuaj kvalitoj, kiuj tuj altiras la atenton de la novaj adeptoj al nia lingvo; kaj, efektive, Zamenhof, elpensante Esperanton, starigis por ĉiam la fundamentajn regulojn, kiuj devas esti bazo de iu ajn internacia lingvo.

Sed, kvankam la eltrovo de tiuj ĉefaj principoj estas jam vera geni-aĵo, oni baldaŭ konvinkigas, kiam, post longa praktika uzado, oni ekkonas la propran spiriton de Esperanto, ke nia Majstro havis ankoraŭ multe pli rimarkinde genian inspiron kaj lingvistikan senton, kiam li propravole rifuzis entlimigi sian lingvon en rigidaj katenoj de teoria severa regularo.

Zamenhof komprenis, ke unu sola homo ne povas doni vivon al lingvo; li sentis, ke lingvo ne estas matematika problemo, solvebla per ekvacioj, ke en ĝi devas resti ia elasteco, ia nedifiniteco, por ke ĝi povu sin adapti al la diversaj pensmanieroj de malsamaj popoloj, ke super teoria reguleco kaj filozofa rigoreco devas regi praktika fleksebleco kaj uzebleco; kaj tial li intence lasis en sia lingvo sufiĉan liberecon, por ke la lingvo akiru fluantecon kaj propran vivon, ne de sia aŭtoro, sed de sia popolo. Estas do nia devo, amikoj-Esperantistoj, ke ni senhalte laboradu por riĉigi, beligi, viviĝi nian belan lingvon.

Kelkaj malsprituloj, kiuj nur ekkonis nian lingvon per teoria esplorado en kabineto, proklamas, ke lingvo internacia ne rajtas pretendi al literatureco!

Kia absurdaĵo! Kie estas leĝoj, kiuj malpermesas, ke la esperant-istaro uzu sian lingvon laŭ sia plaĉo? Kie estas la ĝendarmoj, kiuj

nin enkarcerigos, kiam ni verkos dramon aŭ poezion en Esperanto?

Lingvo internacia, kiu ne taŭgas por ĉio, lingvo, kiu povas nur servi por difinitaj praktikaj celoj, estas morte-naskita.

La amo al belo, al arto, al noblo estas nedetruibla sento en la homa koro. Lingvo sen animo estas lingvo sen popolo.

Ni do kore aplaŭdu la talentajn literaturistojn, kiel nian kamaradon Frederiko Pujula, kiu kuraĝe laboradas por krei memstaran, altspiritan, propran literaturon en Esperanto.

Tiuj-ĉi du belaj drametoj pli faros por firmigi nian lingvon, ol mil broŝuroj de miopaj filozofoj.

CARLO BOURLET.

AŬTUNAJ VENTOJ

Unuakta dramo

PERSONOJ

NARCISO, maljuna kamparulo.

ANNO, lia edzino.

PAŜTISTO.

Hejmo de farma domo en la Kataluna kamparo.

Dekstre estas la hejma fajro. Kiel ombrelo, larĝa kamentubo kovras ĝin, ornamita per blupentritaj teleroj. — Tablo ĉirkaŭita de benkoj kaj seĝoj, staras antaŭ la fajro. Mure oni vidas du ŝtupojn de ŝtuparo supreniranta la unuan etaĝon.

Maldekstre pordo; ĝi estas fermita.

Ĉe la fundo, larĝa vitra fenestraro ebligas vidi la arbaron; luno ĉi tiun pale lumigas. Angule, malalta pordo kondukas al ombra stalo.

Kribriroj, bovaj kaj ĉevalaj jungaĵoj, terlaboriloj, falĉiloj kaj vipoj, ĉiuj de araneaĵoj kovritaj; bulbaro pendas de muro. Trogo, vinujoj, felsakoj kaj stangoj kuŝas apudmure sur tero.

Oletumilo lumas sur la tablo.

AŬTUNAJ VENTOJ

Unuakta dramo.

SCENO UNUA

NARCISO, ANNO

ANNO, *maljuna kamparulino, faldas tolaĵojn sidante apud la fajrejo. Ŝia edzo NARCISO riparas korbegon.*

En mallaŭto sin banas la kampa domo.

ANNO, *ne plu laborante, kaj kun la tolaĵoj sur la genuoj, restas atente rigardante antaŭen. Ankaŭ ne laborante, NARCISO rigardas ŝin.*

NARCISO, *post momento, Annon demandas.* — Kion vi pensas nun?

ANNO *surprizita de lia voĉo ektremas, kaj poste, promeniĝante sian rigardon ĉirkaŭen, malllaŭte respondas.* — Mi timas, Narciso!

NARCISO *reprenante sian taskon.* — Ho, ho, ho!

ANNO. — Mi havas timon.... De la pasinta lundo mi ne povis forpeli lin de antaŭ mi. (*Ŝi malpligrandiĝas ĉe la kubutapoga seĝego, sur kiu ŝi sidas, kaj antaŭen etendas la manojn kvazaŭ ŝi ion forpelus.*)

NARCISO. — Certe, vi estas virino! Diru: ĉu vi okazigis al li ian malbonaĵon? Ĉu vi ne kondukis por li, kvazaŭ li estus el nia sango? Nu! Kion do vi timas?

ANNO, *teren rigardante.* — Ĉu ni scias multfoje, ĉu ni faras ian malbonaĵon?

NARCISO. — Ho, ho, ho! Kion vi devis fari, estis tio: ne iri lin vidi. Jen!

ANNO, *skuante la kapon.* — Vi estas prava! (*Kun teruro.*) Li estis tiel stranga, kaj certe, mi kredas, la farita de li grimaco estas tio, kio lin rememorigas al mi. (*Ŝi senkonfide ĉirkaŭen rigardas.*)

NARCISO. — Bone, bone, sufiĉas, mia Anno! (*Post malgranda silentiĝo.*) Pli bone estus, se la mortintoj revenus, la malfeliĉuloj...!

ANNO, *nerve.* — Ĉu vi volas min kredi? Ni ne parolu pri ili! (*Reve.*) Ŝajnas, ke oni ilin alvokas!

NARCISO. — Sed vi estas, kiu parolas kaj reparolas ĉiam pri ili!
Silento. Ekstere, hundo malgaje bojas.

ANNO *terurita.* — Ĉu vi aŭdis?! (*Denove oni aŭdas bojadon.*) Ĉu vi aŭdas?!!

NARCISO. — Estas la hundino, kiu bojas en la pajlejo.

ANNO. — Kion ŝi flaris?

NARCISO *priokupita, sed ĝin kaŝante.* — Sed kion vi volas, ke ŝi flaris!

ANNO. — Kompatinda besto! Sendube, ĝi bedaŭras la paŝliston!

NARCISO. — Pli verŝajne, ĝi aŭdis iun vagantan tra la monto!

ANNO. — En tiuj ĉi horoj, kiun vi povas supozi vagantan tra l'kamparo?! (*Hundo rebojas.*)

NARCISO. — Ĉasiston malfruantan, eble.... (*Li ekstaras.*)

ANNO, *kun mistero.* — Ĉu vi scias, kion diris al mi Blava, la mastrino de l'malgranda farmodomo?

NARCISO, *kun la atento pli eksteren ol sian edzinon.* — Kion ŝi diris al vi?

ANNO. — Kiam ŝi eksciis, ke Panizo mempendiĝis, ŝi diris al mi tion : Dingu plej rapide novan paŝliston; ĝis kiam vi havos tiun, kiu revarmigos la kuŝejon, Panizo vagados ĉirkaŭ la farmodomo ĉiunokte!

NARCISO. — Virinaj sensecaĵoj! Vi nur estas bestoj! Silentu, mi petas. (*Li antaŭeniras ĝis la fenestraro atente aŭskultante. Denove bojas hundo.*)

ANNO. — Narciso! Narciso!

NARCISO *haltas starigante flanken la kapon. Post paŭzo.* — Ŝajne iun mi aŭdas!

ANNO *krucigante la manojn.* — Ho ve! Pura Virgulino!

Ŝi preĝante murmuretas. Paŭzo. Oni aŭdas du frapojn ĉe l'pordo. Teruro desegniĝas sur la vizaĝoj de la gefarmistoj. NARCISO signe diras al Anno, ke ŝi silentu. Oni aŭdas tri novajn frapojn.

NARCISO *energice, kun videbla peno.* — Kiu estas tie?!

SCENO DUA

NARCISO, ANNO, poste PAŜTISTO

PAŜTISTO, *ekstere.* — Mi, estas! Malfermu!

ANNO *ekstaras.*

NARCISO, *alproksimiĝante la pordon.* — Kiu estas tie?!

PAŜTISTO, *ekstere.* — Ĝi estas mi. La paŝtisto de Kasa'o.

NARCISO *al Anno.* — La nova paŝtisto, Anno! Ĉu ni povis ĝin pensi?

ANNO *ridetante malgraŭ si mem.* — Ha! (*Serioziĝante*) Ne malfermu! Rigardu bone antaŭe!

NARCISO *tra la serurtruo.* — Kiel oni nomas vin?

PAŜTISTO *ĉiam ekstere.* — Laŭvole!

NARCISO *same ol antaŭe.* — Kiu dungis vin?

PAŜTISTO. — Mariano la tartanisto¹. Li alvenis hieraŭ Kasa'on kaj diris al mi, ke vi aŭ iu ajn dungos min. Ĉu ne estas ĉi tie la Narcisa hejmo? Nu! Malfermu, homo!

NARCISO *malfermas nefidemetate. Eniras malvarmeta aero, kaj kun ĝi PAŜTISTO. Tiu Paŝtisto estas dudek-kvinjara knabo kun ĉirkaŭvaga-anta rigardo kaj frenezula vizaĝo. Li estas vestita per ŝnurŝuoj, rebura pantalono alligita per ŝnuro, de la piedradikoj ĝis la genuoj, ĉokoladkolora trikoto, ruĝa larĝa zomrubando kaj Emporda'a ĉapo. Sur la ŝultroj li portas veston, kaj sur la flanko felsakon. Li tenas vergon per la mano. Ŝafara hundo estas lia tuta sekvantaro.*

1. Tartano estas durada veturilo kun arka tegmento el tolo, per kiu en Katalunjo regule oni vojaĝas de vilaĝo-vilaĝon.

PAŝTISTO *enirante*. — Sanktan nokton al ĉiuj kaj sanktan ripozadon al la mortintoj de tiu ĉi hejmo!

NARCISO *kaj ANNO reciproke sin rigardas*.

PAŝTISTO *delasas sur benkon veston kaj felsakon, kaj teren kuŝigas la hundon*.

NARCISO *fermite kaj barinte la pordon*. — La nunaj horoj ne estas oportunaj por trairi la montojn. Certe vi devis celi por alveni, kiam la suno estis ankoraŭ alta.

PAŝTISTO. — Kion vi volas? Mi ja forlasis Kasa'on sunleviĝe.

NARCISO. — Ĉu vi perdiĝis do?

PAŝTISTO. — Ne!

NARCISO. — Tiom da tempo tamen sufiĉus por veni kaj returnen iri!

PAŝTISTO *revante*. — Nu! Mi trairis la Oran Valon, kaj haltis en la voja enveturejo.... Ĉu vi ĝin konas? Tie estas tiaj knabinoj...! Oni estas junulo, jen... kaj... (*Li eksidas.*) Belaj knabinoj, certe (*Paŭzo.*) tre belaj.... Mi neniam trovis tiajn en la arbaroj...!

ANNO. — Kiel vi diras, ke vi estas nomita?

PAŝTISTO. — Laŭ via volo. Ĉie, kie mi ĉeestis oni min nomis malsame.

ANNO. — Sed via nomo, kiu estas?

PAŝTISTO *penante por reekmemori*. — Mi tute forgesis; mi ja ĝin ne reekmemoras! (*Li scieme rigardas la ĉambron kaj speciale la plafonon.*)

NARCISO. — Kiel do vi deziras, ke ni nomu vin?

PAŝTISTO *pripensinte*. — Paŝtisto!... Ĉu vi ĝin ŝatas?

NARCISO. — Bonege!

ANNO. — Se vi ŝatas ĝin!

NARCISO *daŭrigas la korboplektadon*.

PAŝTISTO. — Jes, mi ŝatas ĝin, ĉar ĝi estas mia metia nomo... kaj, kiam homo estas io, estas ja iom. (*Post malgranda paŭzo.*) Lasu min alproksimiĝi al la fajro; estas tia malsekeco en tiuj ĉi diaj montoj.

ANNO *pretigante lokon por li.* — Eksidu ĉi tien.... Eble vi ne vespermanĝis?

PAŬTISTO. — Ne.

ANNO. — Ho, ĉu vi vidas? Mi faros por vi olean supon.

PAŬTISTO. — Ho, estas ne bezone. Mi portas panon kaj fromaĝon en la felsako.... (*Ĉi tion li prenas.*) Ĉu vi havas bulbon?

ANNO. — Ho, jes!

NARCISO *al Anno.* — Boligu al li vinon!

ANNO *al Narciso.* — Certe, vi estas prava. (*Al Paŭtisto.*) Ĝi revarmigos vin.

PAŬTISTO *ĉerpante aferojn el la felsako.* — Se ĝi estas via deziro!

ANNO *iras serĉi la bulbon, kiun ŝi elprenas el bulbaro pendanta ĉe la muro, kaj ĝin al Paŭtisto donas. Klopodante.* — Mi estas tute kontenta pro tio, ke vi alvenis.

PAŬTISTO *kun mordaĵo da pano en buŝo.* — Des pli bone, mastrino.

ANNO. — Vere, vere; mi estas kontenta.

NARCISO. — Sed, kiel, diablo, vi tiel lerte trovis la ĉi tieon?

PAŬTISTO *mordante la bulbon.* — Simple. Oni adresis min tre bonege.... Nu! Estas necble, ke homo vojperdu; vi havas vinberojn kun folioj tiel ruĝaj!...

NARCISO. — Ho, jes! Nun ĉe la aŭtuno, vi estas prava.

PAŬTISTO. — Kaj ankaŭ, ĉar vi ĵus senŝcligis la korkajn arbojn, kaj ili montras siajn nudajn ruĝajn trunkojn. Oni diris al mi: knabo, vojperdi vi ne povas; certe vi trovos la farmodomon sangadantan. (*Li manĝas.*)

ANNO, *kaj NARCISO faras movon.*

PAŬTISTO *streĉas la brakojn mallaboreme; poste li reprenas la panon, kiun sur la benko li estis lasinta; li krakigas la langon, ĝemetas, kaj remanĝas.*

ANNO, *kiu ne ĉesis lin observi.* — Ĉu vi ne fartas bone?

PAŝTISTO. — Jes, mastrino.

ANNO. — Eble la marŝado lacigis vin?

PAŝTISTO. — Ne mastrino.... Mi havas tian nervostaton!... Kial vi ne malfermas la fenestrojn? Ĉio estas tiel fermita ĝi tie!

ANNO. — Kio! Ĉu vi deziras glaciigi?

Paŭzo. Paŝtisto manĝas; Narciso plektas; Anno klopodetas ĉe la fajro.

PAŝTISTO *ĉirkaŭrigardinte malgaje la ĉambbron*. — Sed, kiel ĝi okazis, diru... vi... vi... (*serĉante lian nomon*)... Narciso, ke vi dungis min kiel paŝtiston?

NARCISO. — Ĉu mi ĝin scias? Dum la klopodado por trovi novan paŝtiston, Mariano la tartanisto al mi diris — ĉar li scias, ke mi estas tedita de la enlandaj paŝtistoj — : « Iun mi konas, kiu taŭgos por vi ».

PAŝTISTO. — Mi komprenas. Ŝajne do, vin ne kontentigis tiuj, kiujn vi havis ĝis nun?

NARCISO. — Ne multe. La lasta, kiu ĉeestis kun ni jam de kvin jaroj, ŝajnis bona, sed la lastan horon li difektigis.

PAŝTISTO *kun flanka rigardo*. — Ĉu vi ne bone regalas la paŝtistojn?

ANNO. — Kontraŭe, mia filo! Kvazaŭ ili estus el nia sango, ni ilin regalas!

PAŝTISTO. — Mi tion demandis nenial; sed kiam servantaro plendas!...

NARCISO. — Servantaro, ĉiam kaj ĉial, plendas! Homo dungita estas ne kiel en sia hejmo, kaj tial....

PAŝTISTO *pripenseme*. — Jes, vi estas prava, ja. Oni devas esti tre oportune, en propra hejmo!...

ANNO. — Ĉu vi ne havas familion?

PAŝTISTO. — Ne. (*Silento.*) Mi flaras strangan odoron en tiu ĉi domo!

ANNO *mire*. — Kian odoron vi flaras?

PAŝTISTO. — Mi ne scias; kvazaŭ mi flarus ion malsekan.

ANNO. — Tamen, mia filo, nia kampodomo estas bone ventolita!

PAŬTISTO *nerve*. — Sed, kion vi volas, ke mi diru? Mi sentas odoron, kin tute al mi ne plaĉas!

NARCISO. — Pli malbonajn ol ĝi eble vi flaris, knabo!

PAŬTISTO. — Vi ja estas prava, vi! (*Silento.*)

ANNO *servas la vinon al Paŭtisto.*

PAŬTISTO *trinkinte*. — Vi diris, ke mia antaŭulo difektiĝis en la lasta horo. Kiel do li agis?

ANNO. — Li mempendiĝis.

PAŬTISTO *leviĝas, rigardas la gemastrojn, atente observas la ĉambron, flaras profunde, gestas kvazaŭ li rekonus ion, kaj poste reeksidis malvarme.*

ANNO *kaj NARCISO lin rigardas senmove.*

PAŬTISTO *tre mallaŭte*. — Li mempendiĝis!

ANNO. — Jes.

PAŬTISTO *reflaras; liaj okuloj malfermiĝas grande; nerva tremado trakuras lian haŭton; multekscitita*. — Kial do li mempendiĝis!?

(*Kriante.*) Kial do li mempendiĝis!?

ANNO *mirigita*. — Sed kio vin kaptas nun!

NARCISO. — Kiaj kriegoj!

PAŬTISTO *kviete, mallaŭte, malvarme*. — Kial do li mempendiĝis?

ANNO *kaj NARCISO plialtigas la ŝultrojn.*

PAŬTISTO. — Kie li pendigis sin?

ANNO. — Je korka arbo.

PAŬTISTO. — Ĉu per zonsnuro?

NARCISO. — Ne, per ŝnurego uzata por alligi la bovinon, kiam ŝin ni melkas.

PAŬTISTO. — Kaj kiel okazis ja afero?

NARCISO *pli pripensante ol respondante al Paŭtisto*. — Vere, la afero estis tre stranga, ĉar ni ambaŭ multe amis Panizo'n.

PAŬTISTO. — Kaj li, ĉu li amis vin?

NARCISO *plialtigante la ŝultrojn, arkigante la brovojn kaj rigardinte*

ANNO. — Li estis maljuna kaj havis maniojn, kiel ĉiuj maljunuloj. « Oni maljuniĝas » — li diradis — « Oni maljuniĝas ». Kaj tion dirinte li nebuliĝis, kaj tiam ne estis rimedo por igi lin paroli.

ANNO al Narciso. — Estas vero. Sed diru, kion al tiu vi respondadis.

NARCISO. — Ho, nenion. Tio estas, ke vidante lin tiel malgajan, kiam li rememoris pri sia maljuniĝo, unu tagon mi diris al li : « Forgesu ĉion ĉi; neniam io mankos al vi; kiam por konduki la ŝafaron vi ne taŭgos plu, vi eksidos ĉi tien antaŭ la pordon, vi sunbaniĝos... kaj... ». Jen estas ĉio !

ANNO. — Nu ! Ja de kvin jaroj li ĉeestis en nia hejmo !

PAŬTISTO al Narciso. — Kaj li eble ridis ?

ANNO. — Kial do li estus ridinta ?

PAŬTISTO. — Ĉar tiaj diritaĵoj estas plezurigaj, kaj homo ridas.

NARCISO. — Neniam li tiel serioziĝis; li dankis nin kaj restis momenton rigardante la plafonon. Poste li faris : Pze !

ANNO. — Li ĉiam faris : Pze !

NARCISO. — Du tagojn antaŭ la pasinta lundo ni sendis la hundinon ĉe bestkuraciston, por ke li ŝin observu !

ANNO. — Mi kredas, ke li nur atendis trovi sin sola.

NARCISO. — Jen la nokto estis alveninta, kaj ni ĉiam atendis. Nu ! Panizo ne venis. Tre malagrabla estis tiu atendo; la norda vento tre forte blovis, kaj ni ĉi tie glaciĝis.

ANNO. — Rimarku, ĝi estis la unua tago, kiam ni bruligis lignon.

NARCISO. — Ni nin metis en la liton. La sekvantan tagon, kiam ni vekigis, antaŭ ol ion fari, mi venis apud lian kuŝejon por vidi, ĉu li alvenis dum la nokto, tra la stala pordo, kies ŝlosilo li ĉiam kunportadis. Panizo ne ĉeestis, kaj la ŝlosilo estis en la serurtruo interne.... Tiam mi vere maltrankviliĝis, sed tamen mi pensis...

ANNO, kiu sekvas la rakonton atente. — Unue vi alvokis min !

NARCISO. — Jes, mi alvokis ŝin kaj diris tion, kio okazas. Unue, mi opiniis, ke li eble fariĝis kolera.... Kelkafoje oni ne scias.... Ĉu

vi komprenas?... Kaj ke, liberiginte sin, li iris servi aliajn mastrojn.

ANNO. — Li ĉiam diradis : « Mi deziras foriri malproksimen. »... Ĉar nenie li estis kontenta, la malfeliĉulo !

NARCISO *daŭrigante sian rakonton*. — Sed poste mi diris al mi : Ĉu io eble estas okazinta al li ĉe la arbaro?... Se la hundino estus hejme, nenio, sed precize ŝi forestis.... Tiam mi prenas tranĉaĵon da pano kaj paron da figoj pensante, ke dum mi matenmanĝos, mi povos promenantate rondiri sur la bieno.... Mi do eliris tra la doma postaĵo suprenirante inter la karobujoj, rekte al korkarbaro, kie li kutimis paŝti la brutaron. Mi marŝadis manĝetante kun neniom da apelito certe, kaj rigardante la teron.... Subite, mi haltas.... Se mi estus paŝinta du paŝojn pli, mi ektuŝegus liajn piedojn....

ANNO. — Dio bona, pardonu lin !

NARCISO *tre ekscitita*. — Tere estis lia ruĝa ĉapo.... Li havis la kapon postenĵelita, ĉar la kunligo estis ja ĉi tie ĉe la gorĝo....

PAŬSTISTO *mallaŭte*. — Sufiĉe !

NARCISO. — El la buŝo eliris fadeno el malmoliĝinta sango, kiu fluadis sur lian kolon....

PAŬSTISTO *same ol antaŭe*. — Sufiĉe !...

NARCISO. — Ho, Sankta Virgulino ! Liaj okuloj estis malfermitaj kaj momente mi kredis, ke liaj pupiloj moviĝadas. (*Paŝtisto kaj Anno aŝkultas kun grande malfermitaj okuloj, la unua malgraŭ si mem.*) « Li vivas » mi ekkriis, kaj kvankam tremante mi antaŭeniris al li por lin malpendigi.... Tiam mi vidis, ke ne la pupiloj moviĝadis, sed ke tabanoj profunde enmordetis liajn okulojn !

PAŬSTISTO *kriegante*. — Sufiĉe...e...e...e!!! (*Granda spirado svingas lian bruston ; li havas terwan minacan rigardon ; liaj manoj tremas. Longa paŭzo.*)

ANNO *kaj* NARCISO *iom malantaŭeniras*.

PAŬSTISTO *kvieliĝinta, konvinke*. — Mi ne pendigos min, mi, ne !

ANNO. — Vi ? Pura Reĝino ! Vi tre bone agos, do !

PAŬSTISTO. — Mi ne pendigos min, mi, ne. Ĉar mi ne nur estas

paŝtisto : mi *faras*; kaj tial ke mi *faras*, mi iom pli ol paŝtisto estas.

NARCISO *mallaŭte, malgraŭ si mem.* — Kion vi *faras* ?

PAŬTISTO. — Ho!... Mi *faras*!... Ĉu vi scias ?

ANNO. — Tre bone, sed kion ?

NARCISO. — Ni vidu!

PAŬTISTO *levante la kapon.* — Mi *faras* kantetojn !

NARCISO. — Vi ?

PAŬTISTO *jesas per la kapo, kun gaja rigardo.* — Jes! (*Paŭzo.*) Vi vidas do, ke mi ne povas....

ANNO. — Ho, mia Dio! Jen estas bela afero! Nu! *Li* ankaŭ konis tre belajn!

NARCISO. — Rilate al tio, mi povas diri, ke li sciis parkere ĉiujn popolkantojn de l'estinteco.

ANNO. — Eĉ fluton li ludis... kaj rigardu kian objekton li neniam forlasis. (*Ŝi montras infanan akordeonon¹, kiun ŝi elprenas el la kamena telerapogilo, kaj el kiu ŝi elirigas du sonojn.*)

PAŬTISTO *atente observas.*

ANNO *rigardante malgaje la akordeonon.* — Malfeliĉulo!!

NARCISO. — Li ĉiam kantadis. De ĉi tie oni lin aŭdis, kiam li paŝtadis, kaj eĉ kelkafoje per lia kanta spirado ni komprenis, ke li dancas.

ANNO *ektuŝante sian frunteton per la montra fingro.* — Laŭ mi... li estis... tiel bonhumora, kiel maljuna!

PAŬTISTO. — Ho, sed li nur kantis tiujn, kiujn li *sciis*... sed mi....

ANNO. — Kion, vi ?

PAŬTISTO. — Mi ilin *faras*; mi jam ĝin al vi diris.

NARCISO *mirigita.* — Ĉu vi verkas kantetojn ?

PAŬTISTO *jesante per la kapo.* — Aŭdu unu el ili! (*Kantante*)

1. A. accordeon. F. accordéon. G. akkordion. H. acordéon. I. accordéon.

« Adiaŭ Marianeto,
De mia sopir' princin',
Se ne estus vin koninta
Mi ne bedaŭrus nun vin.

.....
..... »

(*Li fajfas la ceteron ĝis la fino de la strofo.*)

ANNO *mirigita*. — Ĉu tion vi enmuzikigis?

PAŬTISTO. — Ho! kaj ĝi estas ankoraŭ pli longa.... Kaj mi bone imitas la rankanton (*ĝin li faras*); kaj la januaran ampledon de la katoj (*ĝin li faras ankaŭ*).

Paŭzo. Paŭtisto alterne rigardas la gemastrojn, kontenta je sia sukceso kaj kvazaŭ demandante, kiel al ili ŝajnas lia lerteco.

PAŬTISTO *kun ĝoja rigardo*. — Kaj ĉi tiun alian? (*Kantante*)

« El tamburistoj, tri
De la milito venis;
La plej malgranda, li
Per man' rozfaskon tenis
Ram, rapataplam! »

ANNO *interrompante lin*. — Nu! kio! Sed ĉi tiun mi povus kanti parkere!

PAŬTISTO *videble konfuza*. — Estas pro tio, ke ĝin mi jam konigis.

ANNO. — Sed, kion vi diras nun?! Fraŭlino mi estis, kaj vi ankoraŭ ne naskiĝis, kiam mi ĝin kantis kun miaj amikinetoj.

NARCISO *ridante*. — Bonege! Rigardu la mensogulon!

ANNO. — Sed kiajn mensogojn vi diras! Ĉi tion certe ni ne englutos!

PAŬTISTO *raŭke kaj mallaŭte*. — Ĉu estas vero, ke vi ekkonas, ke la kanto ne estas mia?

NARCISO *ridas*.

ANNO *ĉe la fajrejo*. — Ho! Jes, kaj eĉ la alia sendube ne apartenas al vi. Jen tio, kion mi pensas.

PAŝTISTO *teren rigardante*. — Ne; vere! (*La interna kolero, kiu lin mordetas, desegniĝas inter liaj brovoj. Li restas malatenta, potencita de premanta ideo. Intertempo.*)

NARCISO *ordigante sian laboron*. — Ha! nun estas tempo por iri en liton. Jam estas malfrue. (*Al Paŝtisto.*) Venu, kaj mi montros al vi vian kuŝejon.

PAŬTISTO. — Ĉu ĝi estas, tiu de Panizo?

NARCISO. — Sed certe!

PAŬTISTO *rifuĝante en angulon*. — Ĝi ankoraŭ devas esti varma!

NARCISO. — Nu! Sufiĉe da maloftaĵoj! Ni iru! (*Li ekiras.*)

PAŬTISTO *sur loko*. — Ne! ne! Sur lia kuŝejo mi tute ne volas sterniĝi!

NARCISO *haltante*. — Ho, kio! Ni iru, do!

PAŬTISTO. — Mi diras, ke mi tie tute ne volas kuŝi!... Kial vi donas al mi la kuŝejon de Panizo?! Kiu povas scii, kion lasis sur la kuseno la songoj, kiujn li havis?... Mi nenion volas el tio, kio apartenis al li!... Vi eĉ estas kapablaj doni al mi lian felpoŝegon, lian bastonon, lian akordeonon (*li preskaŭ ridetas, ... serioze denove*) ... kaj lian hundon... Nu! mi ja ĉion ĉi kunportas kun mi... Komprenoble, rilate al la akordeono... (*Li gestus malestime per la mano. Vanteme.*) Mi dormos ĉi tie.

NARCISO *al Anno*. — Ho! Nu, vi, Anno! (*Li silentas, nesciante, kion diri, kaj staras nedecidema. Anno ankaŭ. Silento.*)

PAŬTISTO *gestas kvazaŭ dirante, ke li eĉ iom ne cedos. Poste lia vizaĝo kontentiĝas, rideto glitas sur liaj lipoj; li gratas la teron per la vergo, rigardas alterne la geedzojn, kaj fine laŭte ridas.*

NARCISO *senmove*. — Pri kio vi ridas?

PAŬTISTO *ĉiam gratante la teron per la vergo, kun la kapo klinita sur la ŝultro kaj rideto sur la lipoj*. — Mi pensas ion.

NARCISO. — Kion vi pensas?

PAŬTISTO. — Nenion, nenion!

NARCISO. — Diru!

PAŝTISTO. — Nenion, nenion. (*Li ilin rigardas ridetante.*)

ANNO *kun timo*. — Kial vi tiel nin rigardas?

NARCISO. — Kion vi pretendas diri per tia rigardo, vi? Parolu!!

PAŝTISTO. — Ne... ĝi estas.., he, he!... Kiom da klopodoj alvenus al vi...

NARCISO. — Al ni?!

ANNO. — Kial? Kiel?!

PAŝTISTO. — Kiom da klopodoj alvenus al vi se mi pendigus min!

NARCISO. — Nu! nu! Sufiĉe da ŝercoj!

PAŝTISTO *ne aŭskultante lin*. — Neniu volus kredi, ke la alia pendigis sin mem; ĉiuj suspektus vin. Certe tiel, kiel mondo ekzistas, vi amuziĝus.... He!... Bone.... Kaj se mi al vi dirus : « Ĉi tiun nokton mem, mi pendigos min?... » Ho! kiel plaĉus al mi vidi viajn klopodojn!

ANNO. — Silentu, silentu!

PAŝTISTO. — Fine, kial ne? Kiu povas malebligi ĝin al mi? Ĉu vi povas ĝin malebligi? Ĉi tion neniu povas malebligi al mi, neniu,... neniu.... (*Reve rigardante antaŭen si.*) Vivo longa, longa... neniam finiĝanta!... Kaj ĉiam same... ĉiam egale...! La ŝafaro poste, la hundo ĝin ĉirkaŭkuranta... kaj arbaroj, pli da arbaroj, ankoraŭ arbaroj.... Hove!... Ĉiuj vin vidas pasi... kaj... kiu vi estas? Neniu. « La paŝtisto, tie iras la paŝtisto.... » Kontraŭe, kiam oni., ĉiu parolas pri vi., ĉiu bedaŭras vin., la tuta vilaĝo ekmoviĝas, kaj ĉiuj kampodomoj, ĉiuj ebenaĵoj kaj eĉ la tuta monto ankaŭ... dum vi... kiajn klopodojn, ho! kiajn klopodojn!...

ANNO. — Mia Dio, mia bona Dio!

NARCISO *energje*. — Knabo, kion vi diras? Vi nescias, kion vi diras!!

PAŝTISTO. — Ho, tre bone mi scias, kion mi diras.... Nu, malfermu, ĉar mi deziras eliri.

NARCISO. — Ne, ne, vi ne eliros.

PAŝTISTO *prenante siajn objektojn.* — Ni ĝin vidos, ĉu mi ne eliros.

NARCISO *al Anno.* — Mi kuras al la vilaĝo alvoki homojn!

ANNO. — Ne lasu min sola, ne lasu min!

PAŬTISTO. — Ĉu vi aŭdis; mi volas eliri!

NARCISO. — Ne, vi ne eliros.

PAŬTISTO. — Do, mi pendigos min tie ĉi mem!

NARCISO. — Ni vin malhelpos.

ANNO. — Ni al ĉiu diros, kial vi tion faris!

PAŬTISTO. — Neniu kredos vin. (*Ironie.*) Du mependiĝintoj dum tiom malmulte da tempo!

NARCISO. — Ho, ne, vi ne atingos vian celon!

PAŬTISTO *kriegante, ploregante, kiel infano.* — Malfermu, malfermu... mi ĝin volas... malfermu... ĉar mi volas min pendigi!

ANNO *al Narciso.* — Ne malfermu al li; li estas frenezulo!

PAŬTISTO *kiel antaŭe.* — Malfermu!... Mi ne povas vivi, mi volas mependiĝi, mi devas pendigi min! (*Li ekiras al pordo.*)

NARCISO. — Ne! Ne! Malantaŭen!!

PAŬTISTO *per surdiganta kriego.* — Malfermu, mi postulas!

NARCISO *svingante falĉilon.* — Malantaŭen!

PAŬTISTO *kvietigante, malvarme, trankvile.* — Se vi mortigas min, estos same.

NARCISO. — Malantaŭen! Malantaŭen!

PAŬTISTO *ekprenas feraĵon.*

ANNO *al Narciso.* — Malfermu, lasu lin foriri, Narciso. Malfermu pro l'am' al Dio!

PAŬTISTO *ombre minacante.* — Malfermu! (*Mallaŭte.*) Se vi mortigas min, estos same.

NARCISO *post paŭzo tute malfermas la pordon. En ĉambrom eniras malvarmeta aero.*

ANNO *sin ŝirmas kontraŭ ĝi, ĵetante sur siajn ŝultrojn la unuan trovitan tukon.*

PAŬTISTO *lasante la feraĵon kaj enspirante.* — Ha!... Ĉio malobstrukcas mian vojon nun... Kiel bona estas la ekstera aĉero!... Post momento, adiaŭ al ĉio! (*Al ili.*) Ĉu la tramonta vento balancis Panizo'n! (*Li ridas.*)... (*Al si mem.*) Ĝis nun, kio estis ĉio? (*Serioze, pripenseme.*) Unu post unu el ĉiuj ŝafaroj, kiujn mi gardis, oni prenis de mi la ŝafojn por ilin buĉi.... (*Ektuŝante sian frunton.*) Ĉi tie mi havis aferojn, multajn aferojn.... Ĉiajn oni devigis velki!... Kaj nun... « Malfermu! » kaj pordo malfermiĝas... « Tremu! Suferu! » kaj *ili* tremas, suferas....

Li rigardas la hundon, eksidas apud ĝi sur teron kaj ĝin kisas. Silento. Senmoveco. Paŭtisto leviĝas, reprenas siajn objektojn, kaj eliras malrapidege. Silento. Senmoveco.

SCENO TRIA

NARCISO, ANNO

NARCISO *subite, mallaŭte.* — Mi kuras al la vilaĝo; mi vekos la tutan najbararon!

ANNO *senforte.* — Ne, ne! ne lasu min!

NARCISO *staras. Mallonga paŭzo.* — Kion do fari?!

ANNO *post silento.* — Kia malvarmego!... Kia aereto... ĝi tranĉas kvazaŭ tranĉilo.... Fermu!.. kaj ankaŭ la fenestaron!

NARCISO *faras ĝin. Dum ĉi tio, silento. Ambaŭ estas nervaj. Ili rigardas unu la alian teruritaĵ. Iom post iom li apudiĝas al ŝi.* — Kion vi pensas fari? Kion vi volas fari?!

ANNO *per mallaŭta voĉo.* — Genufleksu Narciso, genufleksu kaj preĝu!... (*Ŝi ĝin faras.*)

NARCISO *staras, deturnas la kapon al fenestro kaj kvazaŭ sonĝe li murmuretas.* — Se almenaŭ li estus aliranta al la knabinoj!...





NOVELO

Unuakta teatra verko

Ludita por la unua fojo en Parizo, teatro de *Le Journal*, la 26 de Aprilo 1908,
de F^{ino} PAULA HOEBANX, en la rolo de *Rozo*; F^{ino} CÉCILE ROYER, *Maljunulino*;
S^o GEORGES GROSSET, *Nikolao*; S^o F. PUJULÁ Y VALLES, *Viro*.

« La fervoja maŝinisto Nikolao mortigis hieraŭ sian edzinon. Li plenumis la krimon, kelkajn momentojn antaŭ ol foriri al dutaga deĵoro, kredante, ke li povos erarigi la juĝistaron. Sed, tiun ĉi fojon, ĉiu pruvo estas konvinka. Oni ne konas la motivojn de la krimo. »
(El la *ĵurnaloj*.)

PERSONOJ

NIKOLAO, fervoja maŝinisto; tridek-kvin jaroj; metiaj vestaĵoj.

ROZO, edzino de Nikolao; dudek-ok jaroj; ĉirkaŭ la zono, labora antaŭtuko; sur la kapo, tuko kunligita ĉe la kolo.

MALJUNULINO, ĉifonistino; sorĉistina mieno; kaduka; piedvestita per spartŝuoj.

VIRO, punlaboristo; kvardek jaroj; mizerege vestita; kovrita de polvo; pala, malsanula vizaĝo kovrita de hirtaj hararo kaj barbo; piedvestita per dikaj vagistaj ŝuoj.

Vestiblo de laborista domo.

Funde kaj dekstre (laŭ la publiko), pordo kondukanta tra ĝardeno al strato. Ĝi estas fermita.

Dekstraflanke, ĉambra pordo, kaj apud la muro unu komodo. Sur tiu ĉi, unu vitra kloŝo, sub kiu estas bukedo de floroj faritaj el moluskaj konketoj, du florovazoj sen floroj, kaj religia bildo. — Sur la muro mem, multkolorigita bildo prezentanta simbolon de revolucio kaj sub ĝi, tenita de du najloj, religia benita branĉo de palmo.

Maldekstraflanke, manĝotablo; sur ĝi, petrollumilo kun lumŝirmilo; ĉirkaŭ ĝi, kelkaj seĝoj. Ĉe la muro, vestotenilo el ligno, kaj fenestro duonfermita : tra tiu ĉi, oni ekvidas la straton.

NOVELO

Unuakta teatra verko.

SCENO UNUA

NIKOLAO, *apud la manĝotablo, kun la kubutoj sur ĝi, legas atente ĵurnalon. Li fumas cigaron, elĵetante densajn kaj oftajn buŝojn de fumo.*

Ĉe la maldekstra flanko de la tablo, ROZO ŝikas lukajojn.

La lumŝirmilo projekcias, sur la tablon, rondon de lumo. La cetero de l' ĉambro estas malluma. — Sepa horo vespere. Granda silento ĉie.

ROZO, *kudrante*. — Ci! Atentu; ne malfruiĝu!

NIKOLAO, *malatente, levante la kapon*. — Ĉu?

ROZO. — Ke ci ne malfruiĝu! Jus sonoris la sepa.

NIKOLAO. — Ne, virino, ne. La vagonaro pasas tra ĉi tiu urbo nur je la naŭa, kaj ni ne havas du horojn da manovroj. Mi povas ankoraŭ resti hejme duonon da horo.

ROZO. — Ci mem, do! (*Paŭzo.*) Ja mi diras al ci, ke la fervoja kompanio ne agis dankinde, sendante cin ĉi tien por deĵori.

NIKOLAO, *ne levante la kapon de la ĵurnalo*. — Kion ni povas fari! Estu ĉiu malbono, kiel tiu ĉi! (*Paŭzo. Rozo kudras, Nikolao legas. Oni aŭdas siblon venantan de la fenestro.*)

NIKOLAO, *levante la kapon kaj turnante ĝin al la fenestro*. — Kiu estas?!

ROZO. — Neniu. Kiun ci volas, ke ĝi estu?

NIKOLAO. — Ŝajnis, ke mi aŭdas paŝadon.

ROZO, *rigardinte al la fenestro kaj rekudrante*. — Estas la folioj, kiuj falas.

NIKOLAO, *nerva*. — Lasu, pri folioj! Estas iu, kiu trapasis la

straton. Jam de kelkaj momentoj, mi aŭdas iun irantan kaj venantan sur la trotuaro.... Mi nescias, kial ci lasas la fenestron malfermita....

ROZO. — Ĉu ci kredas, ke mi volas sufokiĝi per tiu nebulo, kiun ci fabrikas per la cigaro?

NIKOLAO. — De alia malsano ci ne mortu!... Mi jam diris al ci, de kiam ni loĝas tiun ĉi urbon, ke ci devas zorgi, por ke ĉio estu bone fermita.

ROZO, *tranĉante fadenon per la dentoj*. — Ni forkuru; dipatrina, kia timo!

NIKOLAO. — Ĉi tie ne okazas, kiel en Barcelono, kie ni estis ĉirkaŭitaj de najbaroj. Tiu ĉi domo estas izolita kaj....

ROZO, *almetante fadenon je la kudrilon*. — Mi nescias do, kial ci luprenis ĝin, ci.

NIKOLAO. — Tial, ke ĝi kuŝas apud la stacidomo, kaj tio estas pli oportuna por mi. Kiam oni revenas hejmen kun kvincent kilometroj en la korpo kaj la pulmoj plenaĵ de karbo, oni ne amuziĝas farante longan piediradon por atingi la liton.

ROZO. — Kia metio la via, maŝinistoj!... Certe mi diras al vi!...

NIKOLAO, *kun la manoj en la poŝoj*. — Ni ne plendu! Aliaj estas pli malbonaj, ol la nia. (*Post paŭzeto.*) Alie, parolante ree pri la domo, diru, kie mi povus trovi pli bonan aferon kaj pli malkaran? Tio estis bona sorto!

ROZO. — Efektive, ci estas prava : tio estis bona sorto.

NIKOLAO, *skuante la kapon*. — Sed, tamen, nun, se mi povus, mi nuligus la luon.

ROZO, *rigardante lin kun surprizo*. — Kaj tio? Nur de du tagoj ni estas ĉi tie, kaj ĉu ci jam havas sufiĉe?

NIKOLAO, *etendinte la krurojn kaj rigardante siajn piedojn*. — Hieraŭ mi aŭdis en la maŝinejo iun aferon, kiu ne plaĉis al mi.

ROZO, *lasinte la tukafon sur la krurojn, sin klininte sur la tablon al Nikolao kaj kun granda atento*. — Pri kio vi aŭdis?

NIKOLAO, *kun la brakoj sur la tablo.* — Tiu ĉi domo restis neluita dum dek-tri jaroj. La lastaj luprenintoj, tiuj, kiuj luprenis ĝin por unu jaro, nur loĝis ĉi tie de du semajnoj, kiam ili cedis la lurajton al ni por preskaŭ neniom.... Tiuj ĉi aferoj ne okazas sen iu kaŭzo.

ROZO, *ridante kaj repreninte la laboron.* — Ni atentu, ke la domo ne estu ensorĉita!

NIKOLAO. — Ho, lasu la sorĉojn!... Ridu, kiom plaĉos al ci, sed kreu min : ŝlosu pordojn kaj fenestrojn! Nun venas vintro, la tagoj mallongigās; ci scias, ke la deĵoro ĉe la rapida vagonaro estas duobligita, kaj ofte mi pasigos du sinsekvajn tagojn for de l' hejmo. Ĉi tie ni estas kiel en dezerto, kaj oni nescias, kio povas okazi!

ROZO. — Bone, bone, bone! Nu! Kio ŝovas cin, ke ci tiom ruliĝas?

NIKOLAO. — Ci legu la ĵurnalojn! Ili estas plenaj de raportoj pri krimoj kaj malbonagoj!

ROZO, *ŝercante.* — Dipatrino, kia timo! (*Relasinte la laboron.*) Aŭskultu, venu al mi ĉi tien!... Ci diras, ke la domo restis neluita dum dek-tri jaroj.... Nu! kaj la maljunulino, kiu loĝas en la mansardo, ĉu ne estas ŝi kalkulinda?

NIKOLAO. — Kiu maljunulino? Ĉu estas maljunulino en la domo?

ROZO. — Almenaŭ, mi ŝin vidis hodiaŭ matene, kiam ŝi eniris.... Ŝi kunportis sakon kaj pasis.... (*Oni alfrapas la pordon. Paŭzo.*)

NIKOLAO, *tre mallaŭte al Rozo.* — Kiu povas esti je tiu ĉi horo?! (*Al pordo.*) Kiu estas?! (*Oni alfrapas denove.*)

NIKOLAO, *stariginte kaj paŝante al la pordo.* — Kiu estas?

ROZO. — Malfermu, kaj ni scios.

MALJUNULINO, *ekstere.* — Bonan nokton Dio donu al vi. Mi estas, mi, la najbarino!

ROZO. — Jen pri la lupro ni parolis... Kion povas deziri tiu virino!

NIKOLAO, *al Rozo.* — Diru, ci : ĉu ci pensas, ke oni devas malfermi?... (*Al pordo.*) Kion... nu!... Kion vi deziras?

ROZO. — Ŝi ja ne manĝos nin!

NIKOLAO, *al Rozo*, — Ne estas nun horo por akcepti iun!... Fine, kio... (*Li malfermas.*)

SCENO DUA

MALJUNULINO, *kun sako sur la ŝultro kaj olelumilo en la mano*,
restas starante ĉe la sojlo. NIKOLAO. ROZO.

MALJUNULINO, *farante krucsignojn, kaj sorĉe, mallaŭte, murmure, rapide*. — Je la nomo de l' Patro, de l' Filo, de l' Sankta Spirito... la malbono, kiun por mi vi volus, estu por vi la bono por vi dezirita, ankaŭ por mi.. .

NIKOLAO. — Kion vi volas, vi, virino?!..

MALJUNULINO. — Mi eliris el mia loĝejo... nu! Kaj diris al mi : necese estas vidi ilin.... Estas la najbarino.... Nu! Kion vi volas?... la kutimo!... Kaj diris al mi : kelkafoje ili povas ion bezoni... kaj inter najbaroj... nu!... mi volas diri, ke vi ne devas ĝeni vin....

ROZO, *al Nikolao*. — Igu ŝin enpaŝi, Nikolao! Kion ŝi faras tie ĉe la sojlo, starante?... (*Al Maljunulino.*) Enpaŝu virino, enpaŝu!

NIKOLAO. — Certe, ja; enpaŝu! Ne estas agrable resti tie ekstere....

MALJUNULINO, *enirante malrapide, farinte rapide kaj kaŝe kvar krucsignojn en la aero al la kvar anguloj de la ĉambro, kaj ĵetinte ekĝemon*. — Mi loĝas ĉi supre... volas diri, ke vi jam scias.... Vi nur devas ordoni.

ROZO. — Dankojn, dankojn.... Same ni diras al vi : se ion vi bezonus....

MALJUNULINO. — Malriĉuloj ni, malriĉuloj, sed kontentetaĵ!... Se ni ne helpus nin unuj la aliajn, kiu helpus nin, malriĉulojn? (*Ŝi rigardas kun persisteco pecon de l' planko.*)

NIKOLAO, *kun la manoj en la poŝoj kaj por diri ion ajn*. — Kompreneble, « hodiaŭ por ci, morgaŭ por mi ».

MALJUNULINO. — Tiel oni diras.

Rozo. — Se vi volas sidi... (*Montras al ŝi seĝon.*)

MALJUNULINO. — Dankojn miaj filoj, dankojn. (*Rigardinte obstine la geedzojn, unu post la aliu.*) Nu! ŝajnas al mi, ke vi ankaŭ ne restos longatempe en ĉi tiu domo.

Rozo, *faldinte la tolaĵojn kaj lasinte ilin sur la tablon.* — Kaj tio, kial, virino?

MALJUNULINO. — Mi malmulte scias pri tio.... Sed la koro al mi diras... (*Dubante, ĉu ŝi devas paroli.*) plie, vi.... Kion vi volas, ke mi diru al vi? Preferinde estas silenti.

Rozo, *ekstarante.* — Vi parolu, parolu!

NIKOLAO, *petege.* — Diru!

MALJUNULINO, *dubante.* — Kelkafoje oni craras..., sed....

NIKOLAO. — Sed, kio?

MALJUNULINO, *decide.* — Nu, do! Ĉar vi havas aspekton de malfeliĉo, jen; kaj malfeliĉo ne volas malfeliĉon, kaj pro tio vi ne faros longan restadon en tiu ĉi domo.

NIKOLAO. — La diablo min kaptu, se mi povas kompreni vin!

MALJUNULINO, *ekforirante.* — Nu, do, dirite estas : se ion vi bezonas, nur vi devas alfrapi, tiel ekzemple per la balailo, kontraŭ la plafonon... tage, mi ĉiam restas hejme... nokte, mi estas ekstere, en laboro; kion vi volas?... kaj eĉ, se vi pafus per kanono, mi ne povus vin aŭdi!...

NIKOLAO, *haltigante ŝin pro subita ideo.* — Aŭskultu momenton. Kial tiu ĉi domo restis ĉiam neluita? Ĉu vi scias?

MALJUNULINO. — Ĉiam? Ĝi ne estis ĉiam neluita!

NIKOLAO. — Nu, diablo! de dek-tri jaroj!

MALJUNULINO, *reveninte.* — Ha! Kio! Ĉu vi nescias? Hum! hum!... Manioj de la homoj! Homojn timigas sango!

Rozo. — La sango, vi diris?

NIKOLAO — La sango?

MALJUNULO, *antaŭenirante kaj montrante lokon de la planko.* — Ĉu vi vidas? Tie ĉi?

NIKOLAO. — Jes!

MALJUNULO. — Do, estas ĉi tie, kie oni trovis ŝin.

NIKOLAO. — Kiun?

MALJUNULO. — Kiun!... Ha, jes, mi forgesis, ke vi nenion scias.... Nu, oni trovis ŝin! Belega, belega virineto!... Kion vi volas! Tiel la vivo, tie ĉi! La plej belaj floroj estas, kiujn oni plej baldaŭ elsiras....

NIKOLAO. — Rabistoj?!

MALJUNULO. — Rabistoj?! (*Neas per la kapo.*) Ĵaluzo!... Kiu scias?... Li estis deca knabo....

Rozo, *faras demandan geston.*

MALJUNULO. — Ne, ŝi ne estis lia edzino. Li aranĝis al ŝi tiun ĉi hejmon.... Kaj subite, jen homaj mizeroj!... Ne, mi nenion aŭdis, mi ĵuras, ke nenion aŭdis.... Okazis nokte; mi neniam restas hejme nokte!... La saman tagon li kuris renkonti la policon!

NIKOLAO. — Ĉu oni kondamnis lin?

MALJUNULO. — Ho, certe!... Rezultis al li kelkaj jaroj de punlaboro... Kelkaj! multaj! ĉaro da jaroj!... Oni diris, ke li estas iom... (*Ŝi apogas la fingron sur la frunto.*) Ĉu vi komprenas?... Sed nenio utilis al li. (*Paŭzo.*) Nu, kun Dio restu! (*Ŝi moviĝas por foriri.*)

NIKOLAO. — Vi aŭdu!... Ĉu vi scias, ĉu la luprenintoj, kiuj estis ĉi tie antaŭ ni, kaj kiuj cedis al ni la lurajton, konis pri la afero?

MALJUNULO. — Jes. Ili nenion konis. Se ili estus konintaj, ili ne forkurus, tuj kiam ili ricevis la leteron.

NIKOLAO. — Kiun leteron!?

MALJUNULO. — Leteron de li.

NIKOLAO. — De li?

MALJUNULO. — De kiu do, vi povas pensi, ke la letero estis? De li, kiu petis revidi la domon.... Ŝajnas, ke oni jam forpermesis lin.... Kaj nu! li volas revidi la hejmon?... Jen! Sanktan nokton! (*Mal-*

rapide elirante, kaj rapide, sorĉe, murmure, kiel kiam ŝi alvenis.) Malbonon mi ne deziras al vi! (*Ŝi eliras.*)

(*Longa paŭzo. Nikolao rigardas la poŝhorloĝon, gratas sian kapon kaj restas rigardante teren.*)

Rozo, *tre pala kaj proksimiĝinte al Nikolao.* — Aŭdu, ci : kaj se vi ne forirus...?

NIKOLAO. — Se mi ne forirus?... Ne, ne, ne : antaŭ ĉio la devo. Mi devas foriri. Mi jam estas malfruiĝanta.... (*Montrante kuraĝon, kiun li ne havas.*) Ĉu vi havas timon?

Rozo, *kaŝeme.* — Ne... timo, ne... sed (*ekĝeminte*) iru, iru... nepre ci devas iri.... Baldaŭ la rapida vagonaro alvenos en la stacidomon.... Nepre ci devas iri. (*Ŝi revenas apud la tablon.*)

NIKOLAO, *post momento, decide.* — Ŝlosu ĉion bone ; por neniu ci malfermu ; kiu ajn alfrapos, ne malfermu al ĝi.... (*Pri la maljunulino.*) Ĉu ci scias? La maljunuloj estas malspritaj. (*Prenante siajn aferojn.*) Postmorgaŭ mi estos reveninta.... Ho, ho, ci havas timon, mia karulino. (*Kun nenatura rideto.*) Ci havas timon!... Kial?! Ci ne devas havi timon!

Rozo. — Ne, ne,... jen... mi ridetas... Ĉu ci vidas? Mi ridetas.

NIKOLAO, *eltirante el la tirkestoj de la komodo aferojn, kiujn li metas en pakujeton kaj kunligante tiun ĉi.* — Kaj poste, kio? Ĉu oni devas limi ion ĉi tie? (*Celante por esti konvinka.*) La urbo estas trankvila.... Jes, jes; la ĵurnaloj parolas ĉiam pri malbonagoj... sed, kio! ili ja devas pleniĝi siajn paĝojn per io.... Ho, jen!

Rozo. — Iru, iru!

NIKOLAO, *rigardinte la poŝhorloĝon.* — Ho, ho, tre malfrue, tre malfrue.... (*Post momento, bedaŭrante esti devigata foriri, sed celante montri kuraĝon.*) Adiaŭ, ci! (*Ili sin rigardas reciproke dum momento, en la okulojn. Nikolao kisas Rozon kaj foriras. Rozo restas senmova, rigardante eksteren. Subite ŝi ektremetas, kvazaŭ malvarma fluo trakurus ŝian korpon. Pala, kaptita de teruro, etendas la rigardon*

ĉirkaŭ la ĉambro kaj rapide volas ŝlosi la pordon. En tiu ĉi momento Viro eniras kun bruo tra la fenestro. Rozo ĵetas grandan krion kaj sin apogas sur la muro por ne fali).

SCENO TRIA.

VIRO. ROZO.

VIRO. — Ne krii, ne krii! mi petegas.... Estas pacema viro!...

ROZO, *tre mallaŭte, kun teruro.* — Kion vi volas!?

VIRO, *rigardante la plankon.* — Mizeroj, mizeroj de la vivo!

ROZO, *same ol antaŭe.* — Kion vi volas... tuj! (*Viro faras paŝon al ŝi, kaj ŝi ekkrias denove.*)

VIRO. — Pli mallaŭte, pli mallaŭte! Ne krii!... Nu, estas sen-utile; neniu aŭdos vin. La maljunulino de tie supre forestas, via edzo baldaŭ forvojaĝos kun la vagonaro.

ROZO, *senfortiĝinte.* — Ho! (*Ŝi spiras forte, terurita.*)

VIRO. — Jes, ĉion mi scias; ĉion mi observadis.... Sed ne timu : neniam malbonon mi faros al vi. Mi neniam al iu faris ian ajn malbonon.... Al neniu!... Ho, mi alrakontos.... (*Rigardinte la ĉambron.*) Ho, ĉi tie!... Mi alrakontos.... Ne, oni ne volis akcepti min; la aliaj, la luprenintoj, forkuris tial, ke mi intencis veni. Ĉiu forkuras de mi!... Ne, oni ne volis akcepti min; kaj mi aranĝis min tiamaniere..., ĉar mi intencis, mi volis veni; mi deziris revidi tiun ĉi lokon, kie mia tuta vivo ruiniĝis....

ROZO, *ĉiam kontraŭ la muro, tremetante.* — Foriru !... Vi revenos morgaŭ, tage....

VIRO, *kun stranga rido, malgaje.* — Morgaŭ! Morgaŭ!... Kiu scias, kie mi estos morgaŭ?... Kiu scias, kio povas okazi morgaŭ? Morgaŭ!... Eĉ nun, post momento, kiu scias, kio povas okazi?

ROZO, *kvazaŭ ekĝemante.* — Foriru!

VIRO, *infane.* — Ne timu!... Ho, vi estas bela, bela! (*Rozo*

tremas.)... ankaŭ kiel ŝi! Ĉar mi havis knabinon (*fermante la okulojn*) belan.... belan.... Havis! Bone diras la popolokanto :

Unu birdeto, kiun mi havis,
Forflugis for;
Unu knabinon, kiun mi amis,
Forprenis mort'.

Rozo. — Ho, ĉu estas vi, kiu!... (*Ŝi fermas la okulojn.*)

VIRO, *per granda krio*. — Ne! Ne estis mi, kiu mortigis ŝin!! (*Plende.*) Ne; mi trovis ŝin ĉi tie.... (*montrante la lokon de la planko*) tie.... Rigardu... jes... estas ĝuste ĉi tie...; sur tiu briko ŝi havis la kapon.... Ho, belega... belega... kaj tie, ĉirkaŭe... sango!... sango!... (*Kriante denove.*) Ne, ne estis mi, ne mi!

Rozo, *senforte*. — Foriru! Foriru!

VIRO, *reve*. — Kiel ĉio reaperas al mia menso! (*Al si, nature, trunkvile.*) Mi venis nokte; mi ĉiam venis nokte.... tage mi laboris, kiel honesta viro.... Estis la deka nokte, kiam mi venis. Mi malfernis la pordon; mi eniris. Ĉio estis en mallumo! Strange! kutime ŝi atendis min, ne dormante.... Mi lumigis. (*Kozaŭ li vidus la pasintaĵon, plorete.*) Ne... ne!... Ho! Malfeliĉulino! (*Kun teruro.*) Mi ĉiam timis la morton; ne, mi nenian rilaton volas kun la morto. For! for! malproksimen la morto!... (*Nature denove.*) Mi forkuris.... Helpon! helpon! mi kriadis.... Ĉio estis senhoma.... Kiel nun! (*Rozo ekstremas.*) La ĉirkaŭaj stratoj, la kampoj kaj domoj najbaraj... ĉio senhoma... kiel nun! (*Rozo ekstremas.*) Helpon! Helpon! mi ekkriis.... Neniu!...

Rozo, *tre mallaŭte, ekĝeme*. — Mizerulo!... Foriru! foriru!

VIRO. — Oni kaptis, oni juĝis min.... Ĉiu homo diras, ke mi estas.... Neniu volas min kredi..., ke mi amis ŝin, ho jes, ke mi amis ŝin, kiel oni amas la floretojn, la floretojn, la beletajn aferojn.... Oni sendis min al punlando.... (*Kun grimaco.*) Oni eĉ volis mortigi

min.... (*Kun stranga rideto.*) Sed ne faris, ĉar mia defendanto diris, ke mi agis en frenezo!...

Rozo, *subite.* — Freneza!?

Viro, *strabe rigardante antaŭ sin.* — Freneza! Freneza, mi!... Nu!... Diru nun, ĉu tio ne ridigas!... Mi freneza!... Ĉu oni iam vidis, ke kristalo povas freneziĝi?... Do, kial mi povas esti freneza, mi, kiu estas el kristalo!... (*Rozo svenas sur seĝon.*)

Ĉar mi estas el kristalo.... (*Lia parolo fariĝas malseka, lia lango elpendas flanke ĉe lia buŝo.*) Rigardu min bone... mi estas diafana... rigardu, kiel mi reflektas la lumon.... Se vi batus min, mi frakas-iĝus! Mi havas la krurojn el kristalo, kaj la brakojn el kristalo, kaj la kapon el kristalo. Mi ne estas, mi ne povas esti freneza.... Se mi estus freneza, mi ne povus esti el kristalo, ĉu ne?... (*Sin turnante al Rozo, kiu restas senmova sur la seĝo, li estas kaptita de granda teruro.*)

(*Al ŝi, per grandaj krioj.*) He! vi, virino!... Ĉu vi ne aŭdas min? Ĉu vi ne moviĝas?... He, vi, virino, virino!... Ne ŝercu.... vi ŝajnas morta; oni ne devas ŝerci kun tio!... Vi respondu al mi! Nu! (*Pasigante la manon sur la frunto.*) Kio estas tio! (*Al ŝi denove.*) Ne, ne imitu la morton; ne ŝercu, mi diras. Kial vi imitas la morton! Mi ordonas, ke vi ne moku la morton! (*Alproksimiĝante iom post iom al ŝi.*) Staru! Staru, mi ordonas! Vi timigas min! Mi havas multe da timo! Staru! Staru! (*Li tuŝas ŝian manon por atentigi ŝin, sed, sentinte la malvarmecon de ŝi, li revenas terurita apud la tablon. Rozo glitas de la seĝo kaj falas laŭlonge kaj senmove sur la plankon. Li restas momenton senmove kun la okuloj tute malfermitaj; poste li reprenas la ĉapelon, kiun li lasis sur la tablo, rigardas terure ĉirkaŭ sin, kaj, alĵetante raŭkan ploran blekon, forkuras ŝanceliĝe al la pordo.*) (*Kurteno.*)



TABELO DE LA ENHAVO

Aŭtunaj Ventoj	9
Novelo	27





KOLEKTO ESPERANTO

Advokato Patelin , unuakta komedio de BRUEYS et PALAPRAT, tradukita de J. EVROT.	
Unu volumo in-16.	Fr. » 75
Albumo de Konataj Esperantistoj , de FRIIZ SCHUCK.	
Unu luksa volumo, 55-paĝa (ekzistas ankoraŭ nur kelkaj ekzempleroj).	3 »
Cikado ĉe Formikoj , el LABICHE et LEGOUVÉ, unuakta komedio.	
Unu volumo in-16.	» 60
Ĉu li? romano originale verkita de D ^{ro} VALLIENNE.	
Unu volumo in-16.	4 »
Diversaĵoj , rakontoj tradukitaj de S ^{ro} LALLEMANT kaj BEAU.	
Unu volumo in-16	1 25
Don Juan , kvinakta komedio de MOLIERE, tradukita de E. BOIRAC.	
Unu volumo in-16	1 50
Elektitaj Fabeloj de Fratoj GRIMM, tradukitaj de D ^{ro} KABE.	
Unu volumo in-16	1 80
Elektitaj Fabloj de LA FONTAINE, esperantigitaj de G. VAILLANT.	
Unu volumo in-16	» 75
Eneido , de VIRGILIO, kantoj I-XII, tradukitaj de D ^{ro} VALLIENNE.	
Unu volumo in-16	3 »
Esperantaj Prozaĵoj , de diversaj aŭtoroj.	
Unu volumo in-16	2 50
Inter blinduloj , de D ^{ro} JAVAL, tradukis S ^{ro} JAVAL.	
Unu volumo in-16	2 »
Internacia Krestomatio , elektis kaj tradukis D ^{ro} KABE.	
Unu volumo in-16	1 50
Kastelo de Prelongo , romano originale verkita de D ^{ro} VALLIENNE.	
Unu volumo in-16	4 »
Kiel ni plibeligos la vivon , originale verkita de SAĆULO.	
Unu volumo in-16, 20-paĝa	» 65
Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia , de A. GRABOWSKI.	
Unu volumo in-16	2 »
Kurso tutmonda , de E. GASSE.	
Unu volumo in-16	» 75

La Avarulo , kvinakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de S. MEYER.	
Unu volumo in-16	» 75
La fundo de P mizero , romano de SIEROŠEVSKI (VACLAV), trad. de D ^o KABE.	
Unu volumo in-16	» 75
La interrompita kanto , romano de ORZESKO, tradukita de KABE.	
Unu volumo in-16	» 75
La kolorigisto aerveturanto , gaja rakonto, de GODINEAU	
Unu volumo in-16	» 30
La kvar Evangelioj , kunigitaj en unu rakonto, de Pastro LAISNEY.	
Unu volumo in-16	1 50
La nevo kiel onko , triakta komedio de SCHILLER, tradukita de STEWART.	
Unu volumo in-16	1 »
Lernolibro de esperanta stenografio , de F. SCHNEEBERGER.	
Unu volumo in-16	1 »
Paĝoj el la Flandra literaturo , tradukitaj de D ^o SEYNAEVE kaj D ^o VAN MELCKEBEKE.	
Unu volumo in-16	1 50
Pola Antologio , elektita kaj tradukita de KABE.	
Unu volumo in-16	2 »
Poŝkalendaro Esperantista 1909.	
Unu volumo in-16	1 »
Poŝlibro internacia por aferistoj, turistoj, k. c. , de NORMAN.	
Unu volumo in-16 (<i>bindita</i>)	2 »
Pri unu speco de kurbaj linioj , von Prof. A. DOMBROVSKI.	
Unu volumo in-16	» 60
Rakontoj pri feinoj , de PERRAULT (Ch.), tradukitaj de S ^{ino} SARPY.	
Unu volumo in-16	1 »
Sub la neĝo , taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro, de J. J. PORCHAT, tradukita de J. BOREL.	
Unu volumo in-16, 144-paĝa	1 25
Tri unuaktaj komedioj , de A. v. KOTZEBUE, T. WILLIAMS, S ^{ino} HANKEL.	
Unu volumo in-16, 96-paĝa	1 »
Unua legolibro , de D ^o KABE.	
Unu volumo in-16	1 90
Verdaj Fajreroj , kolekto da versaĵoj de ROMANO FRENKEL.	
Unu volumo in-16	1 »
Verkaro , libro I ^a , de DEVJATNIN.	
Unua volumo in-16	2 »
Dua volumo in-16, 137-paĝa	2 75
Tria volumo in-16, 144-paĝa	1 75
Vojaĝo interne de mia ĉambro , de MAISTRE, tradukita de S. MEYER.	
Unu volumo in-16	» 75